

Bona Espero



Cirkulero 67

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.

decembro 2006

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ ☎ +49-(0)2902-911323 ★ ✉ u.nelken@t-online.de



Karaj geamikoj,

2006, la jubilea jaro por nia ja jam 25 jarojn aĝa subtena organizaĵo finiĝas kaj rekte transdonas la „laŭrokronon“ al Bona Espero al ties multe pli grava 50-a naskiĝjaro. Laŭ ordono de Giuseppe kaj Ursula, sed same de Ada mi ripetas ties koran inviton al ĉiuj de vi, festi ĉi tiun jubileon kune kun

ĉiuj Bonesperanoj en Brazilo.

Post sia unua atribuo en la lasta rondletero kun la fantaziaj ekspektoj pri la unua eksterlanda vojaĝo de sia vivo la 11-jara Igor raportas pri siaj ekscitaj travivaĵoj en Italio kaj Germanio:

“Kia estas Brazilo? Kia estas via klasĉambro? Kion vi manĝas tie? Kion vi opinias pri Germanio? ĉu vi estis malĝoja, ĉar Brazilo ne gajnis la Tutmondan ĉampionmatĉon de Futbalo? ĉu vi estis kolera ĉar Italio gajnis? Kaj se Germanio estus venkinta, vi estus ŝatinta aŭ ne? Kiam finiĝas via lernojaro?”

Tiajn kaj aliajn demandojn faris la gelernantoj, kun kiuj mi konatiĝis en lernejo en Warstein.



Mia patrino kaj mi konatiĝis kun multaj bonkoraj esperantistoj dum la festo en la bela domo Nelken. Personoj kiuj helpas al Bona Espero kaj mi sentis

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

kasistino:

Dagmar Rahn ☎ Hirschfeldstr. 3 ☎ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328 ✉ dagmar@rahn76.de

dankon al la personoj, pensante al la multaj infanoj en Bona Espero, kiuj multe bezonas helpon ĉar ne havas familion...

Mi ankaŭ vizitis la sesan klason kaj mi vidis ke germanaj lernantoj sidas same sur siaj seĝoj, estas samaj, sen diferenco de koloro, lingvo, nacio, religio aŭ alia. En Warstein mi vizitis ankaŭ groton, tre malvarman, sed tre interesan. Poste ni promenis al kelkaj bestoj, inter ili estis granda kaj bela cervo, kiu manĝis el mia mano. Estis tre emociiga!

Mi vojaĝis al München por revidi nian tre simpatian volontulinon Gabriella Soldan, kaj koniĝis kun ŝiajn du etajn filojn. Kune kun ili ni vizitis la urbon kaj la Olimpikan Turon tre, tre, tre altan, en la komenco mi timis iomete, sed poste ne.

Sed mi faris tiun vojaĝon ne nur por koniĝi kun novajn lokojn, sed ankaŭ, kune kun mia patrino, gvidi ne vidantajn kongresanojn en Florenco dum la Universala Kongreso de Esperanto. Mi ja ne povis imagi kiel sentas blinduloj kaj nun mi tre alte estimas la kuraĝon vojaĝi el foraj landoj ĝis Florenco! Venis blindaj esperantistoj el Rusio kaj Hindio, Japanio kaj Hispanio kaj mi babilis kun ili en esperanto. Esperanto estas mirinda afero kaj mi rekomendas al ĉiuj infanoj de la mondo lerni la lingvon internacian kiel mi facile lernis.

Mi ankaŭ estis en la nekredeble interesa infankongreseto en Prato kaj nun mi havas geamikojn en la tuta mondo! Mi ankaŭ vojaĝis en vera trajno. Ne ekzistas trajnoj en Goiás kaj Brasília.

Estis vojaĝo, kiun mi neniam forgesos. Malfeliĉe, mi ne povis vidi kaj koni la neĝon, sed, do, ĝi restu por alia fojo!"



Kiel vi povis legi en ĉi tiuj lineoj Igor kaj lia patrino do havis plenan programon dum sia restado en Eŭropo. Kiel konvinkaj ambasadoroj de Bona Espero ili renkontis multajn malnovajn kaj novajn amikojn de la infanvilaĝo. – Tiel ankaŭ ĉe somera festo en Warstein okaze de la 25 jara jubileo de la subtena organizaĵo, kiu i.a. kondukis ĉiujn tri geprezidantojn el la tuta institucia historio. Ĉi tie okazis kortuŝaj momentoj de revido kaj konatiĝo. Kune kun sia tre persona raporto pri la plej aktualaj evoluoj en Bona Espero Adarci esprimis la

dankon de ĉiuj bonesperanoj kaj firmigis ĉiujn ĉeestantojn en ilia preteco ankaŭ daŭre subteni la bienon.

Pluraj sukcesaj programeroj estis vizitoj en lernejoj kaj intervjuoj ĉe regionaj radiostacioj kie ambaŭ informis pri sia hejmo.

El Bona Espero Ursula raportas al ni, ke nuntempe tri (!) gevolontuloj subtenas ŝin ĉe ŝia laboro: Vasilii Penny el Germanio, Ksenia Prilepskaja el Polando kaj Yoichi Kaneko el Japanio.



La multaj ĵuse akceptitaj infanoj devenas el ĉiam pli problemaj ĉirkonstancoj.

Antaŭ unu jaro ni skribis en la rondletero pri Maria Odete (9), kiun ŝia patro dum jaroj sekse malbontraktis. Oni intertempe permesis adopti ŝin kaj aliajn tri gefratojn. En Bona Espero nun ankoraŭ nur vivas ŝiaj tri fratoj Deuzimar, Dinei kaj Diolino. La juĝisto permesis al la patrino restadi du tagojn semajne tie. Li kondamnis ŝin pro kunhelpo en la dua instanco denove al 19 jaroj aresto, sed ĝis nun ŝi ankoraŭ vivas en libereco. En la bieno oni terurigis, kiam oni eksciis, ke la patro kondamnita al 23 jaroj de aresto sekse malbontraktis eĉ siajn tri kaj kvin jarojn aĝajn infanojn. La patrino intertempe perdis sian rajton zorgi pri ĉiuj sep infanoj. Ne ekzistas iu espero, ke la familio iam kune vivos.

Vasilii Penny kiel unua germano plenumas sian anstataŭigan militan servon en Bona Espero, kaj tio eĉ dum ĉ. 10 monatoj. Meze de septembro li skribis al ni pri siaj komencaj spertoj post du semajnoj tie:

“Mia ĉambro situas proksime de la knaboj, kaj plejfoje mi zorgas pri ili (vespere enlitiĝi ilin, post la lekcioj okupi ilin, forigi kverelon...).

La vivo ĉi tie funkcias kiel en granda familio, kaj la tagordo estas strikte organizita. Oni ellitiĝas je la 7a horo, sekvas matenmanĝo je la 8a. Je la 9a ĝis la 12a kaj post tagmanĝo kaj paŭzo, de la 13a ĝis la 17a la infanoj vizitas la lernejon (je la 15a kafaŭzo). Je la 18a oni vespermanĝas, kaj ĝis la 21a la infanoj la tempo estas libera, kaj poste ili devas enlitiĝi (la plej aĝa havas 12 jarojn).

Bonvena alterno estas la ofta vizito de ekstere. Multaj eksterlandanoj, plejfoje Esperantistoj, venas ĉi tien por helpi. Estas ĉiam interesaj homoj. – Venontan jaron okazos festego, ĉar Bona Espero aĝos 50 jarojn, kaj oni ekspektas multajn vizitantojn.

La plej proksima urbo Alto Paraíso havas pli ol 30 % senlaborecon, kaj ekzistas tie multaj senhejmaj infanoj resp. infanoj sen familio. La granda plimulto de la enloĝantoj estas nigruloj (la prapatroj estis sklavoj), kaj multegaj scipovas nek legi nek skribi. La plejmultaj resp. preskaŭ ĉiuj kondukas aŭtomobilojn sen ŝoforlicenso, tiom granda plimulto ke la policio rezignis kontroli.

Ili ekzistas de la financa subteno de brazila stato, kiu, kiel Ursula diras, “estas tro malmulte por vivi kaj tro multe por morti”. Ni havas ĉi tie infanojn, kiuj antaŭe studis en ŝtata lernejo, sed ankoraŭ estas analfabetoj.



La infanoj ĉe ni ofte havis terurajn spertojn kaj travivis jam pli ol multaj plenkreskuloj en Germanio. Granda parto de la knabinoj en nia regiono estis sekse misuzitaj en la propra familio, kaj same en la bieno ni havas multajn tiajn.

Jen ekz. knabo, kies patrinon oni enkacerigis, ĉar laŭdire ŝi estis murdiginta multajn amantojn. Kiam ŝi iris en la malliberejon ŝia filo akompanis ŝin, ĉar li ne sciis, kie resti. Tie li preskaŭ malsatmortis, tiel ke oni devis ne nature nutri lin longtempe, antaŭ ol li venis al Bona Espero. Ekzistas ankoraŭ multe pli emociaj aferoj. La plej multaj infanoj estas orfanoj, ne konas siajn gepatrojn. Aŭ ĉi tiuj estas murdistoj aŭ estas en malliberejo pro seksa misuzo de la propraj infanoj, kaj multaj de la infanoj vivis senhejmo sur la strato.

Bedaŭrinde mi ne sufiĉe bone povas interkompreniĝi kun la infanoj, ĉar mi ankoraŭ ne scipovas la portugalan. Ili povas lerni Esperanton vespere en grupeto, kaj helpe de ilia vorttrezureto mi parolas kun ili. Kun la aliaj volontuloj (ekslernantoj de la infanvilaĝo) mi interkompreniĝas per mia ĝis nuna ne perfekta Esperanto.

Mi (espere) rapide lernos la portugalan ĉi tie. Mi jam laŭtlegas al la infanoj tekstojn en portugala lingvo (kiujn kompreneble mi ne komprenas), kaj ili ĉiam ridas, verŝajne pro mia akcento.

Kiam la infanoj estas en la lernejo, mi helpas ĉe la ĝardenlaboro kaj ĉe ĉiuj eblaj laboroj. Mi jam bakis panon, rikoltis kaj rostis kafon. Ĵus mi farbas la ludaparatojn kaj eĉ asistis ĉe la impostdeklaro por la 1000 ha granda parcelo ĉi tie. Ĉiun tagon mi fosas 1 m² grandan truon en la duran grundon, en kiun oni plantas la bananplantidojn.

Mi ĵus lernigas ŝakon al la knaboj. Unu (8) nur nun lernis legi kaj skribi – sed ludi ŝakon mi lernigis al ili en ĉ. du horoj.

Oni ĉi tie volonte akceptus pli da infanoj, ekzistas same ĉiam demandoj pri tio. Bedaŭrinde oni devas rifuzi multajn, ĉar oni ja havas lokon, sed neniun monon! La ŝtato nur nominale pagas al ĉiu infano la monon por unu pantranĉo tage, sed eĉ por tiu ne sufiĉas la mono.



La seka sezono, resp. la plej varma tempo (vintrotempo) ĉi tie baldaŭ finiĝos. Ĉiutempe ni atendas la pluvon por la plantoj kaj kontraŭ la incendiojn de arbaro. Ĵus hodiaŭ nokte la monto baleno brulas, dum mi skribas ĉi tiujn lineojn. La monto estas for de la bieno nur 2 ĝis 3 km. Grandega ardanta baleno! Ni esperas, ke venos estingaviadiloj el Brazilio ĉar la parcelo de Bona Espero havas sian limon direkte ĉe la monto. Alikaze ni eble devus estingi la fajron per piedmatoj aŭ komencos pluvi.

Salutojn el Brazilo

Vasilii”

Siajn personajn kaj certe alimaniernajn pensojn sciiĝas al ni Ksenia, kiu same volontulas en la infanvilaĝo nuntempe:

“En Bona Espero ĉio bonas, varmas kaj floras.

Estas nun printempo, belega vetero, ni naĝas ĉiutage en la lago.

Multan atenton ĉi tie oni dediĉas al ekologiaj, natur-amikemaj metodoj de vivado kaj mastrumado. Do, la telefono, ekzemple, estas senkabla (ĉar telefon-kablojn ĉi tien oni ankoraŭ ne kondukis), do, ĝi estas radiotelefono kaj funkcias per sunpaneloj (sunbaterioj), kiuj dum la suna parto de la tago akumulas la energion kaj ni uzas ĝin dum la tuta diurno). La elektra energio nur alvenis en 1998, do, oni uzis antaŭe parte sunpanelojn, kandelojn por lumigi kaj multe da laboro faris mane, kiel ekzemple lavi centojn da tukoj. Nun en la ĉefa kuirejo estas eĉ lavmaŝino por manĝilaro

– vere nekredebla luksaĵo, kiun kelkaj jaroj antaŭe la loĝantoj de Bona Espero eĉ ne povis imagi. Temas pri financa subteno de nederlandaj esperantistoj. Oni zorgas ankaŭ kompostadon kaj uzas ĝin poste por propraj plantaroj, kaj ĉefe celas produkti mem tiom multe da produktoj, kiom eblas, kaj nur aĉetas tion, kion oni vere bezonas, kiel sapon, oleon, farunon, sukeron, benzinon, higienajojn.

Ekzemple, infanoj ĉi tie ne trinkas popularajn gasitajn trinkaĵojn kun kemiaĵoj ktp. – anstataŭe ili trinkas freŝajn sukojn de fruktoj kaj legomoj, plantitaj en BE. Malsanigajn bonbonojn ili ricevas malofte kaj laŭ iu speciala okazo aŭ okazeto – anstataŭe aldone al ĉiu manĝaĵo ili havas freŝan frukton aŭ fruktan saladon (ĉi tie abunde kreskas mangoj, papajoj, gujavo, mandarinaj, bananoj, ĵabutikabo ktp.).

Ĉi tie oni manĝas 4-foje dum la tago – matenmanĝo konsistas kutime el du buterpanoj – unu kun fromaĝo, unu kun memfarita marmelado – kaj glaso de frukta teo aŭ lakto (aŭ kafo, kiun oni mem produktas, por ni, plenkreskuloj). La tagmanĝo estas abunda kaj konsistas el 4-6 diversaj manĝaĵoj, inter kiuj ĉiam estas salatoj, frukta deserto, rizo kaj fazeolo, legomoj. Je la 3a horo posttagmeze infanoj ankaŭ ricevas kukon aŭ dolĉan buterpanon, kaj vespere havas ege bonan vespermanĝon. Laŭ mi, la manĝo estas ege satiga, saniga kaj natura.



Interese de la interkultura vidpunkto estas tio, ke en Brazilo oni ne kutimas diri: “Bonan apetiton!” – dum la tuta historio la popolo ja malsatis (kaj fakte malsatas ĝis nun), do, ne bezonas specialan alvokon por komenci manĝi. Vere, tiuj infanoj, kiu estas edukataj en Bona Espero, estas feliĉuloj, se ni komparu nur iliajn manĝeblecojn (eĉ ne parolante pri bonegaj vivkondiĉoj entute, edukado, vestaĵoj, ludiloj, dentpasto, sapon ktp) – grandparte la popolo ĝis nun pro malriĉeco manĝas ofte nur dufoje dum la tago.

Ŝerce Giuseppe diras:

- *Infanoj, ni devas forigi unu manĝon ĉar la prezidento Lula promesis, ke post kvar jaroj ĉiuj brazilanoj povos manĝi 3 foje, kaj ni jam nun manĝas 4 foje! Kia skandalo! Kian manĝon vi volas forigi?*
- *Nenian! – ili krias.*

Kaj mi volas atentigi vin, ke:

a) ĉi tie, en Bona Espero, ĉiam mankas helpemaj kaj laboremaj volontuloj kiel mi,-) – do, bonvenon!

b) Bona Espero bezonas ankaŭ ret-paĝaron – kiu, imagu, ankoraŭ ne ekzistas! Mi pretas okupiĝi pri la enhavo, ĉu iu pretas helpi pri la programado kaj paĝar-konstruado?



c) ankaŭ mankas sendependaj (finance kaj alirilite) homoj, prefere paro, kiuj pretas veni ĉi tien por daŭre loĝi kaj labori por daŭrigi la agrikulturan kaj sociasistan mision de Bona Espero – kaj, efektive, kun la tempo anstataŭigi gesinjorojn Grattapaglia. Jam nun senhalte ili du volontulas de 33 jaroj en Bona Espero, alveninte kiel simplaj turistoj en 1973 kaj kiuj estis magie kaptitaj de la ideo kunigi ESPERANTON – VIVON EN BELEGA NATURO – SOCIAN LABORON KUN INFANOJ en internacia esperanta etoso.

Tio ja estis la ideo de la 6 fondintoj, esperantistoj brazilaj el la urbo Recife/Pernambuco, kiuj en 1957 (do antaŭ 50 jaroj) fondis la Institucion. Du el tiuj 6 ankoraŭ vivas en Recife, sed pro troa aĝo ne plu zorgas infanojn sed nur telefonas de tempo al tempo.

d) Ĝenerale ĉiuj esperantistaj ĉiam estas bonvenaj ĉi tie – kiel diras sinjorino Ursula, “nia fazenda-escola estas fakte propraĵo de la tutmonda Esperanto-komunumo” – do, profitu la okazon!

Ksenia Prilepskaja

Alto Paraiso de Goias, la 15a de Novembro 2006”

Ne necesas aldoni ion al ĉi tiu alvoko! La internacieco kaj integrada forto de Esperanto kaj Bona Espero ja montriĝas ankaŭ en la deveno de la nuntempaj volontuloj.

Kion oni povus raporti ankoraŭ? Unuafoje okazis renkonto de preskaŭ ĉiuj estraranoj de la bieno kaj de ties subtena organizaĵo ĉe la UK en Florenco. Same je la unua fojo prezentiĝis la infanvilaĝo sukcese per propra stando.

Forte emociis la estraron la neatendita morto de nia amiko Frank Helfrich el Halver, granda subtenanto de la bieno. Li kaj lia edzino Brigitta kolektis dum dekunu jaroj dufoje jare imponan monsumon por niaj infanoj okaze de esperantaj renkontoj ĉe ili. Konforme al ĉi tiu grandanima kutimo anstataŭ funebraj kronoj kaj floroj oni petis mondonacon por Bona Espero, per kiu rezultis grandioza sumo.

Kune kun mia kora danko pro via subteno la tutan jaron 2006 mi petegas vin ĉiujn same pri via solidara kunhelpo por niaj infanoj.



*Mi deziras al vi
- ankaŭ nome de ĉiuj bonesperanoj -
belan Kristnaskan Festo
same kiel sanon kaj kontentecon
en paca Nova Jaro
via
Otto Nelken*